6-a JARO, N-o 312



LEIPZIG, 25. / 9. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS SEMAJNE | REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris 12e. — GVIDANTO: E. Lanti. — SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. — ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS SEMAJNE

PRI KALENDARO

La kalendaroj, uzataj en Mezeŭropo, enhavas ĝenerale la numerojn de l' tagoj (1, 2, 3, 4 . . .), iliajn nomojn (lundo, mardo . . .) k plejparte nomojn de ekleziaj festoj k sanktuloj. Du vicojn da nomoj oni povas vidi, unu por protestantoj (anoj de german-kristana religio laŭ Luter) k la alian por katolikoj. Kelkfoje la nomoj de ambaŭ kolonoj samas aŭ similas. Du eklezi-asocioj uzas la kalendaron, pli bone dirite, la kalendarpresistoj k komercistoj donas la spacon al ambaŭ asocioj, kiuj havas preskaŭ la saman celon, regi la homojn eksplautante ilin. Kelkfoje la du eklezioj interbatalas unu kontraŭ la alian kiel kontraŭ abomenan malamikon. Sed en la kalendaro tute pace iliaj sanktuloj staras ŝultro ĉe ŝultro k enstampiĝas en la cerboj de multegaj legantoj.

La interrilatoj de l' du eklezioj similas tiujn inter la du ĉefaj laboristaj partioj de nia epoko. La socialdemokratoj k la komunistoj havas la saman celon. Kvankam oni diskutas pri socialismo k komunismo k teorie diferencigas tiujn du terminojn, efektive la anoj de ambaŭ partioj celas la senekspluatan, senklasan sociordon. Tio estas nedubinda. Multon ili komunan havas. Sed la vojoj diferencas. Ĉi rilate, malamike interbatalante unu kontraŭ la alian, la laboristaj partioj similas la eklezi-ojn. Ke ili prudente mano en mano batalus, kontraŭ la komunan malamikon, por la sama celo, tiun fakton mi ĝis nun en la laborista flanko bedaŭrinde preskaŭ neniam spertis . . .

La laboristoj bezonas k uzas kalendarojn. Ne nur en burĝaj k neŭtralaj kalendaroj, kiuj en preskaŭ ĉiu laborista familio mezeŭropa estas uzataj, oni trovas la nomojn k memoraĵojn de sanktuloj, ankaŭ en kalendaroj de laboristaj klasbatalaj organizoj oni renkontas tiun ĉi eklezian kontraŭklasbatalan varbadon. Ekzemple, en la "Metallaborista Kalendaro por la jaro 1930" de l' germana metallaborista sindikato, la presistoj varbas por eklezia vivo. (Unu escepton mi tamen ne forgesu mencii: la nomojn de la Unua de Majo oni anstataŭis per noto "tutmonda festotago".)

Laŭdindaj esceptoj estas ĉi-rilate kelkaj komunistaj eldonaĵoj, en kiuj estas enpresitaj memorigoj pri revoluciuloj k gravaĵoj historiaj.

Vi nun ne diru, ke la kalendaraj ekleziaj sanktuloj nur estas bagateloj, malgravaĵoj. La ideologio de la kalendar-legantoj estas tre influata de tiu ĉi legaĵo. Ekzemple en kelkaj regionoj oni festas la Nomtagon. Ĉiu homo en Mezeŭropo havas antaŭnomon. Plejparte oni elserĉas la nomon el la kalendaro. La sanktulo estas farata ŝirm-patrono de tiu ĉi homo. Je la tago de sia patronsanktulo, li ricevas donacojn de la familianoj k amikoj. La eklezio predikas, ke la festo de l' Nomtago en la vivo de l' homo estas tre grava, ĉar la homo memoru, ke li devas provi simili, sekvi la ekzemplon de sia eklezia ĉefrolulo. Per tiu ĉi persona maniero oni ligas la homojn al ekleziaj pensoj. La sistemo estas fortigita per lerneja edukado, per kiu la junaj lernantoj multon admirindan pri sanktuloj ekscias k samtempe enradikigas senton, emon por la "defendinda" eklezio. Tial okazas, ke ili kiel plenaĝuloj tute ne povas forlasi la vicojn de eklezianoj, de ekspluatatoj.

La sistemo de ligo pludaŭras per ĉiutaga memorigo pri ekleziaj festoj k sanktul-batalintoj, k eĉ laboristaj organizoj subtenas ĝin. Ĉu ili ne scias, ke kiel fundo de kalendaraj nomoj ekzistas libro, enhavanta 365 rakontojn, historiojn de sanktuloj batalintaj por la eklezio, batalintaj kontraŭ idolanaj malamikoj, kontraŭ la sendiuloj, kontraŭ la homoj, kiuj propraforte volas novkonstrui la "dian" sociordon, kontraŭ ni mem? Kaj ĉiu legado, ĉiu penso pri la ekleziaj okazintaĵoj k sanktuloj instigas la homojn tiel malliberigitajn, kontraŭstari nian liberigbatalon. Ĉu ni helpu tiun ĉi legadon?

Mi demandas, ĉu ne estas eble verki libron enhavantan 365 rakontojn k memoraĵojn pri revoluciaj batalantoj k batalintoj. Mallongaj artikoletoj enestu pri laboristaj gvidantoj, nunaj k mortintaj, pri homoj, kiuj per sia homa forto kreis valorojn, pri sukcesoj de penega longdaŭra laboro, pri sukcesoj malgraŭ malfaciloj, pri venkoj, triumfoj de simpla homa forto, kiun ĉiu laboristo posedas! Ni mem *povas* liberiĝi per nia propra homa forto: nek Dio, nek Ekonomio nin helpas. Tiun ĉi penson fieran k fortodonan ni enradikigu en la cerboj de l' Gek-doj! Tion ni alcelu ne nur per eduklaboro, sed ankaŭ per ĉiutaga memorigo en kalendaraj nomoj, konscie kontraŭstarante la eklezian di-celan edukon.

La demandon starigitan mi jesas. Kaj mi finas mian artikolon per alvoko, per propono. Mi persone estas preta kolekti k kunigi tiurilatajn artikoletojn. Tamen mi konscias, ke kondiĉo de sukceso estas, ke mi ricevu el la tuta mondo rakontojn gravajn por la laboristaro. *El la tuta mondo:* ĉar tiu ĉi verko estu uzota en la tuta mondo! Tial mi petas la SAT-anaron, al mi sendi abundan materialon pri homoj batalintaj k okazintaĵoj, taŭgaj por kontraŭbatali eklezian spiriton k eduki al konscia agado, batalado por justo, por nova sociordo.

Francisko Moravec (14 624),
Grossottersleben, Bz. Mgb., Germanio,
Benneckenbeckerstrasse 12.

LA 1-a DE SEPTEMBRO EN HUNGARIO

Depost la falo de l' Komuno en 1919 ekregis ĉion en Hungario la kontraŭrevoluciaj bandoj. En la unua tempo diversaj neorganizitaj bandaĉoj mortigis, elrabadis laboristojn, etburĝojn k hebreojn. Iom post iom ĉi ĉiuj likvidiĝis k la kontraŭrevolucio organizite ekregis la tutan landon. La laboristaro tute sendefende toleris ĉiujn atakojn de l' unuiĝinta potenco el kontraŭrevoluciaj bandoj k kapitalistoj. Certe ĉiam pli k pli malboniĝis la ekonomia situacio ĝis lastjare atingita — pro raciigo — plej supra alto, pro kies sekvo miloj k miloj iĝis senlaboraj sen ajna ŝajno pri akirebla laboro aŭ ajna helpo. Lastatempe la kapitalistoj-grandbienuloj plej fripone balotigis per la "parlamento" centmilionojn da pengoj por si mem. Dume ili traktis la laboron k panon postulantan laboristaron per policglavoj. Ĉiujn moviĝojn malpermesis la polico. Tamen jam la unuan de majo 1930 la laboristaro malgraŭ malpermeso manifestaciis, sen ke okazis ia interpuŝiĝo. De tiam pli k pli evidentiĝis, ke nia registaro eĉ tiom ne volas helpi senlaborulojn, kiom en aliaj landoj. Tiel iĝis forta la deziro denove ekmoviĝi post longa dormo k montri, ke ni volas vivi malgraŭ ajna malpermeso, postuli "laboron", "panon" k "senlaborulan helpon".

Kiel eĥon de tiu deziro la Federacio el Fakorganizoj decidis proklami laborĉeson je la 11-a horo en 1-a de septembro, ekiri amase el ĉiuj fabrikoj k poste kuniĝante okazigi popolkunvenojn. La tutan landon trablovis tiu ĉi decido k ĉie la K-doj kvazaŭ vekiĝinte el inkubo ekmoviĝis por fari kiel eble plej imponaj la manifestacion k popolkunvenojn.

Ĉu mi diru, ke la registaro malpermesis tiujn aranĝojn? Certe. Sed vane, ĉar la laboristaro decidis ĉie ĉesigi la laboron, ne demandante, ĉu estas permesate aŭ ne, k manifestacii en la burĝa kvartalo de Budapeŝto. Policistaro, ĝendarmoj, soldatoj plenigis la tutan urbon, kiam ekiris la amasoj laboristaj. Depost 11 jaroj ne vidis la urbo tian amason. Ĉirkaŭe 150—200 mil homoj surŝutis la Andrasi-straton k ĝian ĉirkaŭaĵon. Kiam la polico vidis tiun amason k aŭdis la kriojn "laboron", "panon!", "for la Betlen-reĝimon!", ĝi ne povis sin teni k ekatakis la laboristojn per ĉevaloj k sabroj. Ŝtonoj responde ĵetiĝis al la policistoj, la amaso disrompis elegantan kafejon por akiri armilojn, k tiam ekpafis la policistoj. Tri horojn daŭris la atako. En tiu urbparto oni nur povis vidi sovaĝe kurantajn policistojn, eĉ kvinope batantaj laboriston aŭ atakantaj virinojn. Rezulto estis 1 mortigito k ĉ. 500 vunditoj. Samtempe en ĉiuj grandurboj de l' lando okazis manifestacioj, kiujn ankaŭ partoprenis grandaj amasoj; sed tie ne okazis interpuŝiĝoj.

Per tiu ĉi ago la hungaria proletaro komencis fari novan paŝon en sia historio sur vojo al socialismo. La kontraŭrevolucio jam kredis por eterne esti mortiginta la lab. movadon, kredis, ke ĝia "ordo" estas neniam ŝanĝebla. Jen vekiĝas la "kanajla popolo" k montras, ke estas egale por ĝi ĉu malsatmorti aŭ esti pafmortigata. Nemezurebla estas la signifo de tiu tago. Ĝi redonis al la K-doj memfidon k batalpreton. La amaso retrovis sin mem k vidis, ke nur kiel amaso, batalante, estas eble atingi sukcesojn. La hungaria proletaro neekhaltos ĉe la unua paŝo de pli aktiva klasbatalo.

(2828)

LETERO EL USONO

SAT-ano 488

Junio—Aŭgusto

Germana boksisto fariĝas mondĉampiono k kolektas milojn da dolaroj (el tuta enspezo de 700 milionoj da dolaroj!), ĉar usona konkurenca



boksisto malĝuste k kontraŭregule pugnofrapis lin . . . La batalo pri la botelo *(prohibicio)* daŭras k ankoraŭ la leĝo fariĝas pli ridinda . . . Ŝajne, ke en Novjorko magistrato devas subaĉeti sian pozicion, k multe da skandaloj ripete elkovriĝas. . . . Pro la kreskanta senlaboreco la blankuloj pli multe atakas la negrojn k "linĉado" danĝere okazas ĉi-jare . . . Impost-tarifo, kiu altigos la koston de l' vivrimedoj je biliono da dolaroj ĉiujare, fine akceptiĝis spite protesto de 30 nacioj k de pli ol mil eminentaj usonaj ekonomiistoj. Alilanda komerco falis multe . . . Kontraste je ekonomia milito la Kontrakto (kiu reguligas la konkurson en militŝip-konstruado ĉefe inter Britio k Usono) ricevis la subskribon de Huver . . . Malaperis post aŭtuno de 1929 la memfidaj artikoloj pri la senkriza nova kapitalismo de Usono, ĉar multe suferas la laboristoj k la farmistoj. Senlaboruloj kalkuliĝis je 5 milionoj . . . La grava Nacia Civita Banko *(National City Bank)* postulas, ke la salajroj malaltiĝu . . . Sed ankoraŭ pligrandiĝas la skalo de la entreprenoj ĉiam unuiĝantaj en pli grandajn trustojn. Neniam haltas la maŝino en sia anstataŭigo al la homa laboristo . . .

La karbministo frontas novan konkuranton, ĉar norden tra la Misisipivalo la trustoj fluigas per tubvojo "naturan gason" al grandaj urboj de l' nord-oriento. La trustoj ankaŭ jungas la riverojn k la akvofalojn . . . Samtempe ili aĉetas la elektrofortajn kompaniojn en preskaŭ ĉiu lando k, krom en Sovetio, usona kapitalo enpenetras ĉien.

Du notindaj deklaroj: Oen Jang *(Owen Joung)* diras, ke neniu lando sole povas reteni altan vivkondiĉon; Linberg *(Lindbergh)*, la sola aglo de la aero, diras, ke aviado por gajni sukceson devas detrui la landlimojn de la diversaj nacioj . . .

Denove espero leviĝas super la martiroj, Muni *(Mooney)* k Bilings *(Billings)*, enkarcerigitaj depost 1917. La ĉefa atestinto konfesis pri sia perfido k renversis sian ateston pri la ĵetado de la bombo. Sed nur malrapide la leĝo liberigos siajn viktimojn, ĉar la guberniestro timas la kapitalistojn, kiuj enkarcerigis Muni k Bilings pro ilia organizado militema de la laboristoj en la ŝtato de Kalifornio. Sep anoj de la I. W. W. (Industr. Lab. de la Mondo) en Sentrelia *(Centralia)* ankaŭ restas en malliberejo, ĉar ili defendis sin en j. 1919, kiam eks-soldatoj k teroristoj atakis ilian halon. Jam unu freneziĝis; sed la aliaj devas resti dum 25—40 jaroj. Eĉ la eklezianoj (protestantoj, katolikoj k hebreoj) protestas, sed ĝis nun nenio okazis. Fakte en Kalifornio junulino ĵus estis kondamnata je malliberejo dum 1—10 jaroj pro flirtigo de la ruĝa standardo ĉe tendaro por infanoj. Ĉu sennaciuloj povas organizi bojkoton al la filmoj el Holiŭud *(Hollywood)* en Kalifornio, por frapi la animon de la kapitalisto en lia poŝo? . . .

Kreskas la agitado por asekuro kontraŭ senlaboreco, k pli da socialistaj k komunistaj reprezentantoj nun fariĝas parlamentaj kandidatoj.

LA KLASBATALO TRA LA MONDO

La granda striko en Norda Francio finiĝis

En Norda Francio, kie la mastroj posedas fortegan, modele funkciantan organizon, la laboristaro strikis de post komenco de julio ĝis mezo de septembro. Kaŭzo estis la indigno pri la deviga depago farita je la relative tre malaltaj salajroj laŭ la nova asekura leĝo, kiu validas de post 1. julio en tuta Francio. La batalo direktiĝis ankaŭ kontraŭ la tielnomata "premio pri fidelo", t. e. premia pago al tiuj, kiuj montras sian fidelon al la mastroj, hontinda aranĝo, ne akordebla kun la digno de laboristo. Okazis en diversaj urboj de la industria regiono nordfrancia multnombraj manifestacioj, cetere laŭpartie dividitaj — socialistoj k komunistoj aparte. Tie, kie estas socialistaj aŭ komunistaj urbestraroj, la komunumoj helpis per monsubteno k aliel al la strikantoj. La mastra sindikat-unuiĝo *(consortium)* sub direkto de s-ro Le *(Ley)*, havas grandegan koruptan influon sur la publikajn instancojn, la lokan burĝan gazetaron k parton de l' elektantaro. Tial la batalo estis speciale akra k provoj je interakordigo de registara flanko (labor-ministerio) malsukcesis longtempe, ĝis 11. sept., kiam la gazetaro anoncis la finiĝon de l' konflikto per kompromiso. *P. R.*

"Reformoj" kontraŭ la laboristoj en Germanio

La senlaborula asekurkaso konstatis en sia bilanco deficiton de 650 milionoj da mk., k oni konkludis, ke "se oni ne rapide sufiĉe profunde reformas, tiam la bankroto minacas al la tuta soci-asekura kreaĵo. Se la nombro da okupatoj plue malaltiĝas, tiam je la fino neniu plu ekzistas, kiu povus pagi la kotizon al la asekura kaso." Sekve, per la helpo de l' paragrafo 48-a de la regna konstitucio oni reformis — plialtigante la kotizon al la senlaborula asekuro de 3½ ĝis 4½ %, fiksante, ke junuloj aĝaj ĝis 17 jaroj vivantaj ĉe gepatroj ne ricevas subvencion. Kiu libervole maldungiĝas, ricevas nenion dum 6 semajnoj k la subvencio estu malaltigata ktp. En la malsanul-asekuro la subvencio estas malaltigita. Malsanatesto kostas 0,50 mk. g., k la plej grandan parton el la medikamentoj devas pagi la malsanulo. La reakcia Brüning-registaro donacis al la grandbienuloj subvencion da 150 milionoj da mk., k la katolika gvidanto Stegervald postulas por la grandindustrio (laŭ *Rote Fahne*, 28. 6.) 750 milionojn por ĝin revivigi — "post la financa reordigo de l' senlaborula asekuro" . . .

10 084, Dortmund.

NECESAS

ebligi al niaj sovetiaj Gek-doj resti en intima kontakto kun la cetera SAT-anaro! Do, helpu ankaŭ vi viaflanke, prunte pagante por sovetiano la abonmonon por "S-ulo" al **Administracio en Leipzig!**

La bilanco de ribelmovadoj en Egiptio, Hindo-Ĉinio, Italio

Ĉe la Parlamento en Londono oni komunikis, ke estas mortigitaj dum la lasta ribelo en Egiptio 26 civiluloj k vunditaj 204 en Aleksandrio k Port-Said. Je la flanko de l' policanoj 279 vunditoj, neniu mortigito.

En Hindo-Ĉinio soldatoj pafis sur manifestaciantojn: 3 mortigitoj k pluraj vunditoj.

En Italio batalo okazis en Torino k Milano inter laboristoj k policistoj. Kavaleriaj k artileriaj fortoj estis uzataj kontraŭ la laboristoj, kiuj defendis sin per bastonoj k ŝtonoj. Sangaj stratbataloj daŭris plurajn horojn. En la Fiat-aŭtomobilfabrikoj laŭdire la faŝista milico minacis la laboristojn per maŝinpafiloj. Pro la cenzuro ekzaktaj sciigoj pri la ribeletoj ne alvenis.

Pro la liberigo de Muni k Bilings[1]

Granda kunveno okazis en Los Angeles (Kalifornio) por protesti kontraŭ la persekutoj aplikataj depost 14 jaroj kontraŭ senkulpaj kondamnitoj. La organizantoj veturigis tra la stratoj de l' urbo veturilon kun ĉerko k afiŝegoj kun surskriboj, kiaj: "La Justo estas mortinta en Kalifornio" k "Muni k Bilings estas senkulpaj". La polico rifuzis doni sian konsenton. Tamen okazis la veturado de l' ĉerkoveturilo kun afiŝoj. Du organizantoj sekve estis arestataj (unu el ili gvidanto de loka socialista partio) pro "nepermesita veturigo de reklamo tra la strato per veturilo". 1500 personoj ĉe-

[1] *Mooney* k *Billings.*

Memoro je la 15-a de julio en Vieno

La aŭtoro de tiu ĉi priskribo estas SAT-ano, kiu, ĉu pro modesto, ĉu pro alia motivo, petis nin ne subskribi la artikolon per lia nomo. — Red.

La teruraj fiagoj de vienaj policanoj je la 15-a ĝis 17-a de julio 1927 ne estas punitaj ĝis la hodiaŭa tago. Ankaŭ en la paĝoj de "S-ulo" oni nur supraĵe k eĉ ne erete elmontris la policajn fiagojn laŭ ilia tuta krimeco, k tion mi nun faros:

Mi streĉis mian cerban aparaton por trovi iun analogaĵon. Multajn abomenaĵojn de la pasinta k nuna tempoj mi preterpasigis pense, sed ĉiam mi venis al la konkludo, ke tio, kion vienaj policanoj faris, estas multfoje pli krime.

Ni prenu ekzemple la teruran okazintaĵon de la "Bartolomea Nokto". Ĝentilmiene la francaj katolikoj invitis la gvidantojn de la protestantoj je vespera festeno k kiam ĉiuj senarmaj sidis ĉe la tabloj, ili ĉiujn kelkcent personojn buĉis. Certe, terura, ne senkulpigebla fiago, tamen ekzistas almenaŭ la klarigo de la religia fanatiko, kiu eble al multaj kredigis tion bona kvazaŭ diplaĉa ago.

Alia terura ekzemplo estas la buĉado de la armenoj en la jaro 1915 (ĉirkaŭ aŭgusto/septembro 1915). La turka registaro agis kun la scio k sen la kontraŭstaro de la tiama germana imperiestra registaro. La turkoj laŭ ordono de sia registaro iris en la armenajn vilaĝojn k urbojn k mortigis senescepte ĉiujn de la suĉinfano ĝis la plej aĝaj gemaljunuloj. Ili ofte ĵetis la homojn en torentajn riverojn k laŭlitere ekstermis la armenan kristanan popolon. Ankaŭ tie estis parte mahometana religia fanatiko instigita kontraŭ kristanoj, k laŭ ekzistantaj dokumentoj (mi legis tiajn en la socialdemokrata viena gazeto "Arbeiter-Zeitung") la turkaj aŭtoritatoj oficiale ordonis tion k homoj, kiuj sentis kompaton je la viktimoj k petis pri indulgo, ricevis la respondon de la aŭtoritatuloj, ke ili nepre senescepte mortigu ĉiujn.

Sed vienaj policanoj estas miloble pli fiaj ol la antaŭe cititaj fiuloj. Ili en multegaj okazoj, amase, plej fie, antaŭ-pripense, malvarmsange fitraktis, kripligis, murdadis homojn sen eĉ la plej eta neceso aŭ bezono: ili murdis pro neniu alia kaŭzo ol pro la plej fia, nura plaĉo k ĝuado je murdado. Kiom nekredeble aŭ ŝajne cinike tio sonas, mi tion tuj pruvos al vi:

Transportu vin pense en iun ajn grandan urbon en la mondo, kien ajn vi volas. Vi loĝas en antaŭurbo, en la tiel nomata periferio. De tie vi devas fari longan vojon, eble duonan ĝis unu horon piede, por alveni la centron. Estas bela, varma somera tago. Ĉio estas trankvila k paca ĉirkaŭ vi, la suno brilas per sia plej glora fajrego, la homoj iras laŭ siaj komunaj, ĉiutagaj klopodoj. Estas ja labora tago, unu el tiom da aliaj samspecaj en la longa jara vico.

Do vi iras en la strato aŭ eble via edzino, se vi tian havas, aŭ eble via infaneto, ekzemple, por aĉeti lakton. La homaj estaĵoj daŭrigas ĉiu sian

estis la kunvenegon, en kiu parolis dek oratoroj, inter ili Aptn Sinkler *(U. Sinclair)* k Fredo Mur *(Moore)*, unu el la advokatoj de Sako k Vanceti, postulanta la senprokrastan liberigon al Muni k Bilings.

TAGO EL MIA VIVO

Mi estas 26-jara laboristo k loĝas en mezgranda urbo de Germanio. Nuntempe mi estas okupata kiel pakisto en drogvendejo progranda. Matene je la 7-a horo ellitiĝinte, mi estas preta por foriri 15 minutojn antaŭ la 8-a, ĉar mi komencas labori je la 8-a. Mia laboro ne estas streĉa, ĉar mi nur envolvas drogojn k sanigilojn. Sume ni estas 7 pakistoj; mia plej bona amiko (ankaŭ esperantisto) estas inter ili, k kiam estas eble, ni ambaŭ, ankaŭ dum la laboro, parolas esperantlingve. De la 13-a ĝis 15-a mi paŭzas por tagmanĝi. Posttagmeze mi denove pakas ĝis la 18-a, kiam la labortempo estas finita. Sed ofte mi devas ankoraŭ fortransporti pakaĵojn al stacidomo aŭ al poŝtejo. Tiel pasas mia labortago.

Post laborfino komenciĝas por mi pli agrablaj horoj, ĉar mi povas disponi pri ili laŭplaĉe. Ofte mi legas bonan libron, k laŭ mia opinio tio estas tiom necesa, ke mi ne komprenas, ke ekzistas homoj, kiuj ne ŝatas legi. Verdire, mi elspezas por libroj sufiĉe da mono. Kompreneble mi ankaŭ legas "S-ulo"-n, k mi ĉiam ĝojas, kiam mi trovas bone verkitajn artikolojn. Krom tio mi ankaŭ respondas al miaj korespondantoj. Kelkajn tagojn dum la semajno mi kunvenas kun la aliaj esperantistaj K-doj, k somere ni ekskursas k havas duoblan ĝuon, ĉar ni neĝenate vagas tra la bela ĉirkaŭo de nia urbo k parolas nian karan lingvon. Estas bedaŭrinde, ke ne ĉiuj laboristoj ekkonas la valoron de esperanto, k mi kredas, ke la ega indiferento de l' homoj kulpas. Mi volas diri kelkajn vortojn pri tio.

Mi ankaŭ intencis varbi inter miaj kunlaborantoj. Mi ne multon esperis, sed tio, kion mi spertis, estas apenaŭ priskribebla. Mi klarigis al ili la utilon de esperanto, ĝian altan celon kiel interkomprenilo de l' proletaro ktp. Ili aŭskultis, sed poste tre kompateme rigardis min, kvazaŭ ili volus diri: "Nu, vi estas baldaŭ sufiĉe matura por la frenezulejo." Unu estas kuniklobredanto k li diris, ke la kunikloj komprenas lin sen esperanto. Alia eĉ demandis, ĉu oni povas finance profiti ion. Mi kredas, ke la cerboj de tiaj homoj estas tro ŝimaj por ekkoni ion gravan. Sed kia ĝojo! Mi trovis unu K-don, kiu entuziasmiĝis por la ideo, vizitis kurson k bone progresis, ĉar li jam iomete scipovis la anglan lingvon. Sed iutage li surprizis min per la konfeso, ke li volas ĉesigi la lernadon, ĉar lia onklo el Kanado vizitis k konvinkis lin, ke ĉie estas parolata la angla lingvo, k li nun ekkonis, ke tiu lingvo estas la plej grava. Kiu do estas la plej granda stultulo? Tiu, kiu ekkonis, ke nacia lingvo estas pli grava, — aŭ la kuniklobredanto? Mi opinias, ke unu estas inda je la alia . . .

Tiuj okazoj montras, ke antaŭ ol voli fariĝi esperantisto, oni devas fariĝi klaskonscia laboristo. Tamen mi ne malesperas k ĉiam penas disvastigi nian lingvon.

(E. Schenke)

Se vi estus riĉulo? . . .

De tempo al tempo hazarde k neregule antaŭmetiĝas al mi la demando: "Kion vi entreprenus, se vi subite iĝus riĉa?" Mi ja ne pensas pri tio, penadi per ekspluato amasigi monsumojn aŭ postkuregi riĉaĵojn — por tio mankas al mi la materia bazo. Sed povas ja okazi, ke oni neatendite momente ricevas grandhavaĵon, eble kiel heredaĵon de nekonata parenco. Aŭ vi aĉetis loton, eĉ ne intence, sed invalido petis vin k vi nur volis subteni lin — k nun surprize vin trafis la ĉefgajno. Kiel vi sintenus? Ĉu vi burĝiĝus k malkonfesus vian klasan devenon, ĉu vi renegatiĝus kiel multaj aliaj? Aŭ ĉu vi restus fidela al via konvinko, al via mondkoncepto, al viaj samklasanoj? Ĉu vi decidus oportuneme aŭ laŭkore, ĉu vi preferus senzorgan vivon en pompo k brilo aŭ la batalon por pli hela estonto? Kiele vi uzus la enspezitan monon?

Estus interesa scii, kiasence respondus la Gek-doj je tiu ĉi temo.

F. S. (16 362).

Arta eldono, bele ilustrita, originalo de SAT-ano

estas



de LÉON BERGIERS
ilustroj de LUCIEN GILLES

La libro entenas sur 80 pĝ. (form .17×21 cm. en la formo de mallongaj fragmentaj rakontoj ideojn, sentojn pri revolucio, proleta batalo k emancipado. Prezo: 1,80 mk. g.

ADMINISTRACIO DE SAT, LEIPZIG O 27.

vojon, pri nenio malbona pensante, ĉar neniu en la vasta rondo krias, provokas, manifestacias, laŭlitere, fakte: *absolute neniu.*

Subite, en iu parto de la strato, eble ĉe angulo, apud, post aŭ kontraŭ vi, ie en la strato aperas subite fusilarmitaj homoj. — Vi restas spasme ŝtonigita, glaciigita, ne komprenante, kion tiuj homoj volas, kiuj direktas la fusilojn kontraŭ vi. Vi ne konjektas, kiacele ili profanas per siaj murde avidaj rigardoj la belan pacon. — Jen krak, krak: flugas la kugloj, vi faras defendan movon, kliniĝas, eble rapide kuras en proksiman pordon de domo, eble savas vin, sed eble aliaj estas trafitaj k ruliĝas en sia sango ĝismorte aŭ grave vunditaj.

Inter vi, kiuj legas tiun ĉi artikolon, certe estas ankaŭ skeptikuloj, kiuj ne kredas ĉion, kion aliaj diras al ili. Vi eble pensas, ke mi troigas aŭ ke malamo al la viena polico aŭ ia antaŭjuĝo gvidas min. Bone, se vi tion kredas, vi nur bezonas legi la libron: "Die Wiener Julitage 1927" ("La juliaj tagoj de Vieno 1927") de Julius Braunthal, redaktoro de la socialdemokrata gazeto "Das kleine Blatt" ("La malgranda gazeto"). Krome vi legu la raporton de la esplora komisiono, kiu estis instalita de la komunumo de Vieno, por esplori la buĉadon de la polico.

Tiaj okazoj, kiel la supre citita, ne okazis nur malofte, izolite, bedaŭrinde ne: ili okazis *multege, amase.*

Por ke vi povu bone prijuĝi la okazintaĵojn de la 15-a—17-a de julio 1927 en Vieno, kun kiom da indulgo vi volas, mi priskribos, kion la manifestaciantoj *fakte* faris k poste vi diru mem, ĉu la policanoj rajtis tiel agi kiel ili agis. Do aŭdu:

La kvinan fojon dum nemultaj, eble 4 aŭ 5 jaroj, aŭstriaj tribunaloj absolvis krimulojn, kiuj inside murdis laboristojn. La popolo ekscitiĝis pro pura morala indigno, pensante, ke ne plu ekzistas en Aŭstrio leĝo kontraŭ murdo je laboristoj. Libervole el multaj fabrikoj, je la ekscio de tiu fakto, paceme k orde, la homoj forlasis multajn laborejojn, komencante de la oka matene la 15-an de julio por manifestacii en Ringstrato kontraŭ tia maljusto. Post la oka matene alvenis la magistrat-oficistoj el la urbdomo, intencante unuhoran manifestaci-iradon k postan revenon al la laboro. Antaŭ ol ili alvenis en Ringstrato, ili renkontis policrajdantojn, kiuj baris al ili la vojon k post kelka interparolo la oficistoj ricevinte la permeson de la rajdantoj pluen iri, tion, faris. Nun atentu bone, kia fieco insida okazis: La magistrat-oficistoj *post* la permeso iris ne multajn metrojn antaŭen, kiam la policrajdantoj subite, sen ia averto, *en plej rapida galopo* rajdis en la nesciantajn homojn, sabre dispeciganté, hufbatante, vundante, mortigante ilin, persekutante ilin ĉien, eĉ sur la trotuaron. De la kontraŭa direkto alvenis manifestaciantoj el la elektrofabriko Zimens k H. (*Siemens & Halske*), kiuj kompreneble nenion sciis pri tio. Subite la rajdantoj turniĝis k brute, *senaverte,* galopadis en la nov-alvenantojn, farante plej fiajn kruelaĵojn je kosto de multaj viktimoj.

(Daŭrigota)



Redakcia adreso: A. SCHWARZ, Lerchenstr. 14
Neckarsulm (Germanio).

Raporto pri la Junulara Fakkunsido en Londono

(5. aŭgusto 1930)

La kunsidon prezidis K-do Braŭkman, kiu ĝin post kantado malfermis je la 19½-a horo. Ĉar mankis ĉia raporto, li donis parolpermeson pri ajna temo. K-do Wessels, petinte la parolon, rakontis pri la anarkista junularmovado, laŭtlegante leteron de anark. K-do el Sovetio. Kelkaj Gek-doj deziris ĉesigon de tiu unuflanka pritrakto, petante la parolanton pri raporto de laboro de li farita pasintjare. K-do Wessels kontraŭis k deziris, ke ĉiu rakontu, kiel k kial li aliĝis al iu partio. Post vigla diskutado rezultis el voĉdono, ke la Gek-doj deziras paroladon pri la SAT-junulara movado. K-do Wessels nun rifuzis pluan kunlaboron forlasante la salonon. Kelkaj K-doj nun raportis pri sia laboro farita pasintjare en la div. junular-movadoj.

Malgraŭ mankaj raportoj de la sekci-gvidantoj la prezidanto proponis pritrakti nian laboron farendan, priparoli estontan materialon por "J. P.". Estis proponita la reelekto de la ĝisnunaj gvidantoj, kiujn K-do rekomendis. Alia protestis kontraŭ ilia agado koncerne la kongreson. Multaj estis la deziresprimoj rilate al la enhavo de "J. P.". Disertoj pri jenaj temoj estas dezirataj: "Junular-movado", "Esp. kursoj por infanoj", "Seksvivo, gravediĝo", "Junula vivo", "Gravaj junulproblemoj", "Kutimaro k vivo de ekstereŭropa junularo". Dezirinda estas la presigo de novaj kantoj. Propono, ke ĉiu raportu al la redaktanto k tiu resume prezentu tiujn raportojn ĉe la XI. Kongreso, estas malakceptita pro neefektivigeblo (?). Instigante la Gek-dojn je vigla kunlaborado la prezidanto fermis la kunvenon je la 21.30-a h., esperante, ke venontjare venu multaj raportoj. La kunvenon ĉeestis 43 Gek-doj el 7 landoj.

K-dino 16 599.

Raporto de la sekciestro

Necesas klarigi al la Gek-doj, ke mi transsendis mian raporton al la OKK petante transdoni ĝin por la Junulara Sekcio al K-do Latimer. (Tiu K-do ne partoprenis la kongr. — *Red.*) Tio ne okazis; la kialon mi ne scias. Se ankaŭ K-do Latimer ne ĉeestis, tiam oni povus transdoni ĝin al la estro de la fakkunsido.

Pri la agado de l' sekciestro ne estas multo por raporti. Dum la Leipziga Kongreso ŝajnis, ke la junularo en nia movado volus pliaktiviĝi, sed poste montriĝis, ke nur kelkaj kunlaboris. Interesiĝis pri la vivo de la Sekcio Gek-doj el Sovetio, Anglio k Nederlando. Sed ankaŭ la aktiveco de la Sekciestro ne estis kontentiga. Estas dissenditaj 15 poŝtkartoj k 13 leteroj (afranko elspezita *4,65 mk.g.)*.

Ĉar mi ne tiel dediĉis min al la Sekcio, kiel necesas, k ankaŭ estonte mi ne povos fari tion, tial mi rezignas intencante transdoni la estrecon al K-do A. Schwarz (redaktanto)[1].

Dietr. Keŭning (10 742).

Raporto de la redaktanto

Akurate kvar semajnojn post la Kongreso mi sciiĝis pri la maltrafo de mia raporto, kiun mi ĝustatempe sendis al la Kongreskomitato (K-do Sulsky), surkoverte petante ĝin transdoni por laŭtlego al la junulara fakkunsido, al K-do Latimer. Mi tre bedaŭras tiun maltrafon de l' raporto, en kiu mi prezentis por diskuto gravajn problemojn: 1. *Kreo de porjunula bulteno* (tiun eksperimenton ni povus fari, se minimume 200 Gek-doj konsentus et-kotizė kovri la elspezojn por papero, afranko k multobligo. Temas pri bagatele malalta sumo!). 2. *Organizado de interlanda raportado.* El ĉiu lando 1—3 Gek-doj komisie raportu pri ĉiuj *por-* k *per*junulaj kunvenegoj. kongresoj.

Unujara sperto montris al mi, ke la SAT-junularo malhavas ajnan organizon. Nia laboro estis ĝis nun tute hazarda, tute senplana. Vervaj alvokoj jen ne helpas. Necesas krei kadron de povaj k emaj K-doj. Necesas havi almenaŭ unu junulperanton en ĉiu urbego, ne nur surpaperan, sed aktivan, laboreman K-d(in)-on.

Ĉiuokaze tia fidindulo sukcesos prepari la necesajn aranĝojn okaze de kongreso aŭ alio. Kiom multe pli fruktedona estus nia fakkunsido Londona, se . . .! Sed mi ne kritikas estinton, espere mi konsideru estonton k prezentu konkretajn taskojn: Vi junkdino, vi junk-do, el suda varmego, el norda malvarmego, el teknikema okcidento k aŭrora oriento, ĉu vi volas sampaŝe kun ni, kantante la venkocertajn, ĉiame revoluciajn juneckantojn, marŝi al batalo, al klasbatalo? Jes! Ne hezitu! Freŝforte ekiru, interrilatu kun ni! Tiam realiĝos pli facile nia sopirego kunvenadi el tuta mondo en libera forton donanta tendaro. Lingvoj nin jam ne disigas. La ilo por interkompreno ja estas nia — k la vojon de interkonsiliĝo (ĉu kongresa, ĉu perletera) vi helpu prepari.

Kaj pri "J. P." kion mi raportu? Ĝi aperis regule; ĉiuj artikoloj sur ĝi estas originalaj, sed ekzamenu la verkintojn — ili estas malmultaj! Ĉu ankaŭ via parafo jen foje aperos?

A. Schwarz.

[1] Kvankam mi principe konsentas transpreni la laboron de la Sekciestro maksimume por unu jaro (do ĝis venonta kongreso), mi tamen deziras aŭdi ĉion el la Gek-daro ĉi-teme. Estas dezirinde, ke iu juna energia K-dino aŭ K-do sin disponigu por tiu ofico. Kiu volas? — *A. Schwarz.*

Migra tago de l' socialista junularo

(Fino. Vd. n-on 305/6.)

Baldaŭ alvenis tagmezo k kun ĝi la tempo por manĝi. Junaj homoj estas ankoraŭ iom romantikaj. Unu el tiaj romantikaj faroj estas la komuna kuirado, kiu samtempe estas tre bona okazo por fortigi la komunsenton k reciprokan helpemon. Dum la kuirado ĉiuj laboroj estas dividataj. La junuloj serĉas ŝtonojn, por konstrui "fornon", aliaj kolektas sekan lignon k la inoj transprenas la oficon de kuiristinoj. La fajro estas ekbruligita, post mallonga tempo bolas la akvo k baldaŭ bonaj, agrablaj odoroj, kiuj preskaŭ similas je tiuj de granda hotelkuirejo, venas el la granda kaldrono. Kiam la manĝajo estas preta, ĉiuj alportas telerojn k unu K-d(in)o dispartigas la enhavon de l' poto. Pro la moviĝado dum ludo k sporto ĉiuj havas multe da apetito k nun manĝas fervore, kelkfoje interrompante pro ridoj k ŝercoj. Mi kredas, ke la grandaj, solenaj manĝadoj de ministroj aŭ reĝoj ne estas tiel gajaj, bonhumoraj k ŝercoplenaj!

La posttagmezon ni same pasigas per ludado. Kelkfoje ankaŭ okazas, ke ni ĉiuj sidiĝas en rondo k K-do aŭ K-dino laŭtlegas ion el libro, aŭ ni serioze priparolas temon, kiu rilatas nian vivon, asocion, laboron ktp. Tio estas tre bona faro, ĉar ni tiel edukas la gejunulojn al meditemo, pripensemo.

Kiam la ombroj plilongiĝas k la radioj de l' suno ne plu tre varmigas, ni ordigas niajn dorsosakojn k turnas niajn paŝojn hejmen. Nun trapasante

TRA ESPERANTIO

ADMONO AL LA SAT-ANARO

Bedaŭrinde plej ofte mi sentas min devigata kritiki la grandan plimulton el nia anaro pro la nekompreno pri *sia propra* movado k tial pro miskomprenigado de l' movado al la anoj de la mondaj organizoj laboristaj. Dum mi kritikadis, mi neniam forgesis nian gvidanton, de kiu, kompreneble, mi ĉiam atendis pli multe ol de aliaj. Ĉar, ĉu li ne estas, ĉefe, la kreinto de la SAT-ideo?

Preskaŭ ĉiuj, kiuj min konas persone, havas la impreson, ke mi nur amas kritiki, k vere ŝajnas tiel. Tamen, ili ne scias (ne povas scii), ke mi ĉiam nur atendas la ŝancon por laŭdi. Se tia ŝanco venas tre, tre malofte, nu, tio ne estas mia kulpo.

Feliĉe ĝi venis nun k mi petas la ĉiujn sincerajn SAT-anojn, ke ili juĝu por si mem, ĉu mi ne estas prava. Mi aludas al la artikolo en n-o 304 de "S-ulo" "Londono-Oksfordo" de K-do Lanti. Mi admonas vin ĉiujn, kiuj ankoraŭ ne legis ĝin, ankaŭ tiujn, kiuj "legis" ĝin, ke vi funde ĝin trastudu Mi scias pro mia propra sperto, ke oni ne ĉiam tuj ekkomprenas aŭ eĉ ekvidas la kvaliton de skribaĵo.

Laŭ mia opinio, se SAT-anoj akceptus tiun artikolon kiel lernilon por si k lernigilon por ne-SAT-anoj, nia organizo prosperus — laŭ sia difinita celo — en kompare mallonga tempo.

Unue, bonvolu lerni el tiu artikolo uzi simplan lingvon — ne elĉerpu el la vortaroj ĉiujn grandajn k plej longajn vortojn por montri, ke vi ilin scias (ĉar tiuj vortoj havas sian specialan uzeblon, kiun oni povas nur lerni pro sperto, aŭ prefere, per ioma studado de literatura fako).

Due, notu la facilan klarig-manieron, kiu baziĝas sur konstatitaj faktoj — tiel malsimila al la ĝenerale sofisma argument-metodo, kiu postulas multajn vortojn, kiuj vere diras nenion.

Trie, k plej admirinde, notu la subtonon *sarkasman*, per kiu, ĝentile, sed tamen fortfrape, la aŭtoro malkaŝas la vanton k vanon de la "malamikaj" manieroj k metodoj.

Koncize, la perfekto de tiu artikolo pruvas, kion mi tiom ofte ripetis, ke nur homo, kiu sin serioze dediĉas al sia elektita afero, k kiu ne diletante rilatas al ĉiuspecaj aferoj, povas helpi al sukcesigo de tiu afero.

Neniu "grandegulo" — je aliaj aferoj — povus helpi al ni; neniu Marks, Lenin aŭ Krupskaja, kiuj dediĉis sin al unu altvalora afero, tia kia postulas specialan studadon, havas spacon en siaj mensoj por tiel bone kompreni la utilon k aplikon de la Int. lingvo kiel Lanti, ekzemple — ne pli ol povus Lanti tiel bone kompreni sciencan socialismon kiel iu el la supre nomitaj.

La antaŭvidpovo de ĉiu homo limiĝas. Pro tio Napoleono la I k liaj konsilantoj deklaris, ke Roberto Feltn (*Fulton*) estas freneza revulo, kiam li sugestis aplikon de vapor-forto al francaj militŝipoj, por ke ili estu kapablaj venki la anglajn. Kial do ni atendu, ke altinstruitaj marksanoj k aliaj radikaluloj tuj komprenu nian ideon? Ĝuste pro tio ke ili estas tiel spertaj je unu fako, ili povas esti, k plej ofte estas, infansciaj je aliaj aferoj. Ekzemple H. G. Ŭels (*Wells*), kiu estas mirinda verkisto de utopiaj romanoj, eble ebriiĝinte pro sia famo, proponis antaŭ kelkaj jaroj "razi la barbon" de Karlo Marks. Do de post tiam li ne nur ne tuŝis ĝin, sed, male, perdis la respekton de multaj homoj, kiuj lin antaŭe admiris. Laŭ mia scio, tio okazis k okazas al ĉiu, kiu vagas ekster sia propra sfero.

Kaj se estas tiel, rilate al homoj kiaj supre menciitaj, kian ŝancon havas la simplaj laboristoj, kiuj volas sukcesigi la SAT-aferon, se ili "ludas" per dekduo da malsamaj aferoj samtempe?

Georgo Saville (1092).

---

vilaĝon, ni antaŭ ĝi formas bonordan grupon k poste kantante trairas ĝin, por tiel varbi por niaj ideoj k por montri, ke jam granda parto de l' junularo apartenas al ni.

Kun laca korpo, sed kun animo plena je belaj, ne forgeseblaj impresoj, ni en la vespera krepusko reatingas la urbon k disiras ĉiuj, jam nun ĝojante pri la venonta migrado. Ho, kiom estas bele, esti juna!! Amikeco![1]

Fr. Riedel (14 981), Giessen.

[1] Saluto de l' germ. soc. lab. junularo.

L N E

Ĵus aperis la septembra kajero de

LA NOVA EPOKO

kun kontraŭmilita, revolucia literaturo k novelo de rusa aŭtoro.

Prezo de l' unuopa kajero: 0,35 mk. g.

Jam ekabonu ĉi tiun solan k unikan literaturan revuon en Esperantio, kies nova jarkolekto komenciĝas en oktobro!

Administracio de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27.

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA NOVA EPOKO"

INTER NI

— La fakto, ke sur la paĝoj de "S-ulo" aperis multaj artikoloj, laŭdantaj Sovetion, ne estas sufiĉa; ni volas koni la opinion de la gvidanto de nia gazeto pri la "Kvinjara Plano". Via silento tiurilate ŝajnas al ni suspektinda . . .

Tiel skribis al mi lastatempe iu K-do el Polio. Li eĉ aldonis kelkajn malafablajn vortojn, kiuj, celis esti ofendaj. Sed . . . ies aproboj povas ofendi, alies malaproboj laŭdi.

Se ofendite, mi povus tute ne rompi mian "suspektindan" silenton . . . Prefere, aŭskultu mian tre humilan konfeson: ĝis nun mi ne sukcesis akiri firman opinion pri la "Kvinjara Plano". Ĉiutage mi sentas pri tiu problemo la pezan ŝarĝon el dubo. Kia malagrabla sento estas dubi! Kiom pli komforte estas kredi! Kaj tiu konstato bone klarigas, kial estas en la mondo tiom da kreduloj — diversspecaj.

Ĉu Stalin pravas, asertante, ke oni povas konstrui socialismon en unu sola lando? Ĉu Trocki malpravas en sia mala opinio? Mi vane legis diversajn tezojn, farĉitajn per amaso da nombroj k citoj el Marks k Lenin, sed mia mallarĝa cerbo ne kapablis dece gastigi la legaĵon. Cetere mi ne estas fakulo en ekonomio. Mi do rezignis daŭre porti la ŝarĝon el dubo pri tiu demando.

Almenaŭ mi ne dubas, ke la eksperimento nun farata en Sovetio estas grandioza k meritas ĉies subtenon. Por ke la eksperimento estu konkludiga, necesas, ke ĝi okazu en normalaj kondiĉoj. Aliel la dubo povus resti eterna. Se kapitalistaj ŝtatoj atakus Sovetion; se kontraŭrevoluciuloj sabotus (intence fuŝus) la eksperimenton en la lando mem, estas evidente, ke malsukceso en tiaj kondiĉoj ne havus konkludigan valoron. Ĉiu sekve havas intereson fari ĉion eblan por faciligi la taskon de la eksperimentantoj.

Tia estas pri la demando mia vidpunkto k ĝi klarigas, kial mi rifuzas artikolojn tiutemajn, kies signifo estas negativa k povus havi kiel rezulton ĝeni la eksperimenton.

Aliflanke ĉiu devas scii, ke en Sovetio regas partio, kiu estas sekcio el la III-a Internacio. Laŭ la decidoj de ĉiuj niaj kongresoj, SAT ne devas enmiksiĝi en la interna vivo de l' diversaj partioj. Ni do ne povas permesi, ke oni diskutu, ĉu la Sovetia Sekcio de la III-a Internacio bone aŭ malbone mastrumas siajn proprajn aferojn. Tute ne utilas demandi, ĉu mi kredas

aŭ ne kredas, ke la socialismo povas esti konstruata en unu sola lando. Mi volas stari antaŭ tiu demando kiel sciencisto antaŭ sia retorto: fari ĉion eblan por ke la eksperimento estu sukcesa — almenaŭ konkludiga.

Dume mi dubas. Kaj tiu mia dubo neniel povas malhelpi la grandiozan sukcesindan planon. Mi plie dubas, ke kredantoj povas esti la plej bonaj helpantoj en la eksperimentado. Kredo iel blindigas k malhelpas esti sufiĉe atenta, por ke ĉio funkciu normale k laŭcele.

Mi ŝatus, ke la dubemo estu SAT-aneca virto, — sed kompreneble ne deviga . . . E. L.

GEOGRAFIO, NEPRE NECESA EN NIA KULTURO

Kvankam mi konsentas la ĉefan tezon de K-do Ĵief en lia rubriko en "S-ulo" n-o 307, mi ŝatus diri, ke se ni komencus enkonduki novajn literojn por traduki kelkajn francajn sonojn, tion ni devus fari same rilate aliajn lingvojn. En angla lingvo, ĉiu vokalo havas mallongan sonon tute ne tradukeblan esp-en; ĉeestas ankaŭ la diftongoj: "th", kun du formoj, peza k malpeza (samsona kiel la hispana "c" antaŭ "e" k "i") k "ng". Tiu kombino: "ng" estas evidente ankaŭ tre ofta en kelkaj afrikanaj lingvoj, kiel prononcata, mi tute ne scias (interesas noti, ke jam atingis la redaktejon de Sud-Afriko indiĝenlingva gazeto). En la mallonga urbnomo angla: "Worthing", estas tri sonoj ne tradukeblaj esp-en: "W" (ĉar oni ne rajtas elŝiri "u" el ties diftongeco); "or" k "ng", kiu estas gorĝa sono. Mi scivolas, kion farus el tiu nomo, esp-ist-fonetikisto, ĉar mi malesperus traduki ĝiajn sonojn esp-en! Ĉu ne Ĵief ankaŭ forgesis la kvin francajn nazajn diftongojn: "an", "en", "in", "on" k "un"? Mi kontraŭas al tio, ke oni naciecigu esp-on. Ni male esperantigu la naciaĵojn. *E. K. L.*

NUNAJ TASKOJ DE LA MADRIDA LAB. ESP. GRUPO

Antaŭ 16 monatoj, en esp. kurso, kiun mi gvidis ĉe la Popoldomo, naskiĝis projekto, kiun ni entuziasme tuj komencis realigi: fondi lab. esp. grupon. Efektive de tiu momento la jam starigita Lab. Esp. Grupo de Madrido laboradas por disvastigo de esp-o en lab. medioj, sen diferencigo de politikaj tendencoj. Ni tuj aliĝis al SAT k agitis por ĝi inter la membroj. Dum la unua jaro la LEG malfermis sep kursojn pli malpli sukcesajn en laboristaj ejoj, publikigis por- k peresp-an materialon en lab. ĵurnaloj k okazigis kelkajn sukcesajn propagandajn festojn. Logite de nia fervora agado, unu sindikato mondonacis al la Grupo, k du aliaj donas monatajn subvenciojn. Plej bone taksebla estas la sukceso laŭ registritaj membroj: nuntempe 125. Antaŭ fondiĝo de tiu Grupo SAT apenaŭ havis anon en Madrid k nun venas relative multaj en ĝiajn vicojn. Kelkcentoj da "Petro" k alia SAT-materialo estis menditaj. Ĉe komenco de l' dua vivjaro la Grupo promesis ankoraŭ pliintensigi la laboron, malfermante en sept. k okt. pli ol dek kursojn. Ni celas atingi 200 membrojn por la Grupo k almenaŭ 25 SAT-anojn.

Ni ĵus konkeris la gazeton "Rebelion" (Ribelo), kiu estas klasbatala kun socialista maldekstra tendenco, tre simpatianta la rusan revolucion k tolerema al ĉiuj tendencoj. En ĝi aperas esp. rubriko, por- k peresp-a materialo. Tio signifas fortan propagandon, ĉar la gazeto trovas grandan simpation de la publiko, kvankam ĝi estas nova publikaĵo. La redakcio tre favoras nian movadon k simpatias al SAT. Fremdaj K-doj povas kunlabori per esp. materialo k tradukendaj artikoloj (notoj).

Alia tasko de l' Grupo estas starigi hispanlingvan LEA, interkonsente kun la kataluniaj, Valenciaj k. a. K-doj, kiuj rajtigis nin labori tiucele. Cirkuleroj estas en preparo, statuto ellaborota k dissendota al hispaniaj SAT-anoj k esp. K-doj. Ni petas ĉiujn hispanlingvajn K-dojn aktive kunlabori pro sukcesigo de niaj planoj. Transmaraj K-doj ankaŭ eniru nian Federacion k rilatu kun ni.

En la nomo de LEG: 13 587.

RADIO-MOSKVO

Esp. disaŭdigoj pri diversaj temoj okazos ĉiulunde je 23,30 h. laŭ *Moskva* tempo je nomo de VCSPS (Tutsovetia Centra Intersindikata Konsilantaro) de 15. sept. Ondlongo — 1304 m., frekvenco — 230 kilocikloj. Pri aŭdeblo k impresoj siaj ĉiuj aŭskultantoj bonvolu nepre informi *Radiostacion je nomo de VCSPS* (Moskvo, Solanka 12, Dvorec Truda), ĉar de tio dependas okazigo de pluaj esp. disaŭdigoj. Aliaj ĵurnaloj represu! *V. Polakov.*

TRA LA ESPERANTA GAZETARO

Heroldo de Esperanto regalis nin en pluraj aŭgustaj n-oj (581/583) per detalaj priskriboj pri la kongreso de l' neŭtraluloj en Oksfordo. Laŭdante la variajn amuzajn aranĝojn, la raportanto tamen ne povas kaŝi la malplenon k vanton de l' kongresdebatoj. Ĉiuj tri laborkunsidoj estis tre malbone vizititaj, li notas. Tiel el 1200 kongresanoj laŭ "Heroldo" nur ĉ. 150 ĉeestis la 2-an laborkunsidon! Pri la 3-a kunsido jenaj vortoj: "Vizito treege malbona, sed iom post iom venas pli multaj. Oni apenaŭ kredas tion. Dormado certe ne mankas en O., k ne ekzistas multe da distreblo en la urbo . . . Sed eble la homoj ne venas, ĉar ili tute ne scias, pri kio temos la kunsidoj — la tagordo restas absoluta mistero ĝis la komenco de la kunsidoj mem."

Holanda Esperantisto (de 28. aŭg.) esprimas tion per iom aliaj vortoj, kiuj esence diras la samon: "Oni iam ĝojis, ke la laborkunsidoj estis liberigitaj de la diskutoj pri organizaj demandoj, sed aliflanke oni devas nun konstati, ke ofte mankas interesaj temoj por esti pritraktataj . . ." Dum pri la SAT-kongreso ĉeestinto en sama n-o konstatas: ". . . La fajro de la batalo kaptas ĉiujn, k ne laste la parolanton. Ankoraŭ fluas la frazoj, la tono plialtiĝas, jam ekaplaŭdas kelkiuj ĉe forta esprimo, trafa parolturno. Neniu rimarkas, ke la ĉeestantaro reprezentas tiom da nacioj, aŭ ke la lingvo parolata estas esp-o. Oni nur atentegas la enhavon de la parolado. Genia Zamenhof, kian belan ilon vi kreis! . . ."

En *Flandra Esperantisto* (aŭg.), cetere tute naciista gazeto, ni trovas klaran difinon pri la rilatoj de "naciismo" al "internaciismo". Jen (p. 18): "Mi bone scias: nia movado estas internacia, etendiĝas al ĉiuj popoloj de la tero. Sed la vorto "internacia" ĝuste antaŭsupozas la antaŭan ekzistadon de nacioj. "Internacia" ne signifas ion suprajan, ne signifas la forlasadon de la propra esteco, ne signifas facilaĉeteblan kosmopolitismon. Kontraŭe, ĝi estas la malo. Kiom ajn paradokse ŝajnu, sana internaciismo nur povas elkreski el popolfidela naciismo. La unua perfektigas la lastan, ĝi estas la fina kronado." (Cetere tio estas la vidpunkto de Ĵores k Bebel k. m. a. famuloj en la socialista movado.)

Sennacieca Pedagogia Revuo, kajero tria (julio), liveras abundan materialon por pedagogoj, instruistoj k ankaŭ aliaj personoj, kiuj interesiĝas iel pri edukaj problemoj. Tiaj kajeroj povas interesi vere ankaŭ nefakulojn, dum ili por fakuloj formas fonton de informiĝo k sciiĝo. La materialo estas tre varie prezentita; inter teoriumaj artikoloj troviĝas dokumentoj pri faktoj, k eĉ bildoj interrompas iafoje la raportojn. Bedaŭrinde la preseraroj svarmas en preskaŭ ĉiuj paĝoj.

Kun plezuro ni trovis en *Laborista Esperantisto* (Amsterdam), aŭgusto, sub "SAT-Sciigoj" varman alvokon por la de "S-ulo" organizita monkolektado "Por eviti la rifon". Bedaŭrinde ne ĉiuj LEA-gazetoj okupas sin kun sama intereso k simpatio pri la sorto de l' tutmonda esp. organizo: SAT k ĝia oficiala organo. *N. B.*

Korekto. Bonvolu legi en n-o 310, pĝ. 532, dua kolono, linioj 15 k 18 de malsupre: *ekzakto (vero)* — anst. "korekto".

TRA LA MOVADO

KRONIKO

AŬSTRIO. La fervojista fakgrupo aranĝis nunjare dum ferioj infaninterŝanĝon kun svedaj infanoj (de ferv. esp-istoj). Kvankam nur unu knabo pasigis la feriojn en Svedio *(Prässebo)*, tamen ni multe propagandis. Ok personoj pro tiu interŝanĝo komencis lerni esp-on. La fakgrupo fiksis en sia laborprogramo okazigon de renkontiĝo por en- k eksterlandaj ferv. esp-istoj dum ĉiu jaro por decidi pri pli aŭ malpli gravaj aranĝoj en la sekvanta jaro. La nunjara renkontiĝo okazos je 4. k 5. okt. 1930 en Linz, gastejo "Goldenes Rössl", Pfarrgasse 7. Partoprenontoj tuj anoncu sin ĉe K-do Franz Mittermaier, Linz II, Wiener Reichsstrasse 2 a. *(9437.)* — *NEDERLANDO.* La grupo Zamenhofa (Sekcio Amsterdam V) de la Ned. Lab. Esp. Federacio aranĝis je 4. 9. ekspozicion, kiu malgraŭ malfavora vetero estis bone vizitita. Du Gek-doj parolis propagandvortojn. La ekspozicio estis sukceso por la grupo. La rikolto estas 70 lernontoj. — H. B. (15 408).

ĈE LA KATOLIKOJ

En Budapest okazis de 16. ĝis 20. aŭgusto la 15-a Kongreso de IKUE (la katolika esp. organizo). Partoprenis pli ol 200 kongresanoj el 16 landoj. La malferman kunsidon ĉeestis hungaria kardinalo, episkopo, delegito de la urbestraro de Budapest k la aŭstra ambasadoro. La esp-istoj partoprenis la festojn por la "nacia sanktulo" Emeriko.

*

Iu nederlanda esp. episkopo dekretis jenon: "La katolika esp. movado devas postuli, ke neniaj verkoj, kiuj estas ofendaj por katolikoj, ricevas protekton per rekomendo por ekzamena studado. Se oni ne volos agi laŭ tiu principo, tiam la katolikoj devas organizi proprajn ekzamenojn k ne kunlabori kun la neŭtrala komitato." Tiu minaco adresiĝas al la neŭtralaj esp. ekzamenkomitataj.

MEMORNOTO

Priesper. artik. k notojn enhavis:

L'Effort, Lyon, 16. 8.; *Signalen,* Stokholm, 28. 8., 4. 9.; *L'Eclaireur du Soir,* Nice, 24. 8. (ankaŭ pri "S-ulo"); *Por Internacia Interligo,* Kiev, 15. 8.; *Prolet. Pravda,* Kiev, 3. 8., 9. 8., 14. 8., 19. 8.; *The New Dawn,* Manchester, 30. 8. (pri "La Lab. Esp." en angla).

Pri SAT-Kongreso raportis:

Der Kämpfer, Chemnitz, 19. 8.; *Journalist,* Lond., aŭg.; *Russia to-day,* Lond., aŭg.

Peresper. materialon enpresis:

Raboĉij Kraj, Ivanovo-Voznes., 30. 7.; *Leninec,* Ivanovo-Vozn., 1. 8.; *Vsjegda Gotov,* Ivanovo-Vozn., n-oj 9, 13, 16; *Krasnaj Tŭil,* Ivanovo-Vozn., julio; *Juna Bolŝeviko,* Kiev, 31. 7., 10. 8., 21. 8., 24. 8.; *Prol. Pravda,* Kiev, 1. 8.; *Internacia Interligo,* Kiev, 15. 8.; *Le Réveil Ouvrier,* Nancy, 30. 8.

Salut-alvokon tutpaĝan enhavis en esp-o la *festlibro* por la 1. Asocifesto de l' lab. biciklista asocio "Solidareco" (Dresden, 25./27. julio 1930).

JARABONO
por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla!

NIA POŜTO

16 674. — Via artikolo aperos.

Dramrondo, Lodz. — Vi ŝuldas ankoraŭ unu resp. kuponon.

1729. — Por la afranko la Rondo ŝuldas 3,50 fr. fr.

15 237. — Ni ne povas utiligi vian tradukon.

12 668. — Via traduko aperos.

11 304. — Via artik. en venonta n-o.

Red.

NEKROLOGO

Tre subite la morto ŝiris el niaj vicoj nian fervoran K-don

RICHARD BORRMANN (16 276)

Honoron al lia memoro!

SAT-anoj de Weisswasser.

Esperanto — Intersteno
universala
lingvo — skribo

Intersteno-lernolibroj

Koresponda skribo por Esperanto RM 1.—
Rapida skribo por Esperanto . RM 1.—
3 aldonoj por po 7 naciaj lingvoj po RM 1.—

Instituto de Intersteno
Friedenstr. 79, Duisburg (Germanio)

Haveblaj ankaŭ ĉe la
ADMINISTRACIO DE SAT
Colmstrato 1, LEIPZIG O 27.

Gek-doj atentu!

Nia LEA-grupo intencas ekspozicii dum oktobro. Ni petas sendi al ni materialon: PI, L, gaz. ktp., murgaz. kun traduko. Al ĉ. sendinto ni sendos PI. Adr.: Heinrich Rieffel, Weinbergstrasse 20, *Rüsselsheim a. M.* (Germ.).

KORESPONDADO

AŬSTRIO

— Esp. Rondeto koresp. per L. PI. bfl. Nepre resp. Adr. Ferry Fibisch. *Hirtenberg n-o 62* b. Leobersdorf.

BULGARIO

Jenaj K-doj el *Plovdiv* serĉas gekoresp-antojn el ĉl.: Georgi Katanov k Milan Krotev, str. Volga klou 3, n-o 5. Havĉo Dorev, ul. Jahari Stohanov, 53. Stojan Todorov, ul. Mitropolit Panaret, 40.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Josef Wuchterl, *Holeischen 127* ap. Plzen interŝ. PM kun ĉiuj landoj.

FRANCIO

Roland Pruvot, *Blérancourt* (Aisne) deziras gekoresp. 18—25 jarajn, el AZIO.

GERMANIO

— Kelkaj Gek-doj serioze koresp. kĉl. Bonvolu skribi al: K-dino Z. Rabin, Flandrische Str. 11, *Köln*/Rh.

K-do Hermann Hornig, Lazarusstr. 16/I. 1, *Leipzig. N. 24,* serioze koresp. kĉl, ĉefe pri politiko.

JUGOSLAVIO

K-dino Anete Brenner, Svetosavska 27, *Novi-Sad* koresp. pri ĉ. temoj kun ĉiuj landoj. PI.

POLIO

— Grupo de Lab. Esp. koresp. kun ĉ. landoj pri ĉ. temoj. Resp. garant. Adr. I. Majeloviĉ, Brzerinska 17, *Lodz.*

USONO

Adresŝanĝo. — K-do Geo Johnsson, 15 West, 126 st. *New York, City,* (stratŝanĝo).

ESPERANTISTA RONDETO

inter la "Infanamikoj" (12—14 jaroj) serĉas korespondantojn kĉl. Nepre respondos. Skribu amase al K-do Fritz Donath, *Seifhennersdorf* (Saksio, Germanio) *n-o 597.*

FOTISTOJ

Mi serĉas viglan interŝanĝon de fotoj k fotografaj filmnegativoj kun lertaj fotistoj ĉiulandaj pri lab. movado, naturo, tekniko, manifestacioj k sim. Nur bonaj bildoj interesas min, preferas seriozajn Gek-dojn. Adr.: Willy Espenhayn, Apitzschstr. 26, *Wiederitzsch b. Leipzig* (Germ.).

Atentu! ★

K-do Albin Hollitzer, *Waldsee/Württbg.*, serĉas seriozajn gekoresp-antojn (ne geknaboj) el ĉ. landoj, krom Aŭstrio k Svisio. Al ĉiu skribinto mi almenaŭ resp. unufoje. Mi ne estas PM-kolektanto, pref. L k gaz. por propagandi esp-on.

ENHAVO

	paĝo
Pri kalendaro	547
La 1-a de septembro en Hungario	548
Letero el Usono	548
La klasbatalo tra la mondo	549—50
Memoro je la 15-a de julio en Vieno	549—50
Tago el mia vivo	550
Se vi estus riĉulo?	550
Junulara Paĝo	551—52
Tra Esperantio	552
Korespondado, Anoncoj	554

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)